



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 1

Januaro/Februaro 1964

Federacio ne estas Asocio

La projektita novorganizo de IFEF renkontas multflankan intereson. Ĝi koncernas la fundamenton de la fervojista Esperantomovado. Precipe aktuala estas la komitato, kies estontan funkcion speciala komisiono nuntempe analizas.

La „Komisiono pri la revizio de la IFEF-regularo“ notis unuajn sukcesojn. Ĝi konsentis pri la gvidprincipo en IFEF. La nombro de la IFEF-estraranoj estas fiksita. Ne plu funkcios kiel legislativo dum unu semajno pojarare la delegitoj. Estonte transprenas tiun funkcion, sed dum la tuta jaro, la „komitato“.

Kio estos la komitato? Ankoraŭ neniu povas klare respondi, ĉar la konceptoj pri la karaktero de la komitato disiras. Fakte ekzistas du opinioj. La unua, pli populara, diras: la komitaton formu elito de sendependaj personoj el la landaj organizoj. La alia opinio, reprezentita ankaŭ de GEFA, bazas sur la fakto, ke IFEF estas federacio, ne asocio. Asocio ĉefe kunigas individuojn, dum federacion formas organizoj. Ilian decidrajton respektis la ĝisnuna regularo almenaŭ en la formo de la delegitoj. Oni do devus opini, ke la decid-

rajto pliboniĝos kaj la delegitoj havos decidrajton dum la tuta jaro. Sed vane.

Se la plimulto de la komisiono ne trovos alian solvon, la decidrajto de la landaj organizoj transiros post nelonge al privataj personoj. En federacio estas jure absurde, ke privataj personoj formas la legislativon. La legislativo povas konsisti laŭ sia naturo nur el reprezentantoj de la landaj organizoj. Sed ankaŭ sen respekto por juraj antaŭkondiĉoj ne povos efektiviĝi la revo pri la idealaj komitatanoj. Neniu el ili povos esti devigata transpreni iun difinitan taskon aŭ oficon. Kial do la balasto de nomigitaj kaj respondecaj komitatanoj, se ili en gravaj decidoj ne oficiale reprezentas siajn landajn organizojn?

La komisiono, kies bonvolo staras ekster ĉia dubo, ankoraŭ ne povos ellabori la novajn statutojn de IFEF, antaŭ ol tiu ĉi grava problemo estos esplorita ĝisfunde kun ĉiuj siaj konsekvencoj. Ni estu singardaj, ke la ĝisnuna IFEF-regularo, certe ne perfekta ĉiurilate, kontentige regulu la rajtojn de la landaj organizoj. Nur ili estas la fundamento de IFEF, ne privataj personoj.

W. B.

16. IFEF-Kongreso in Brüssel 9. — 15. Mai 1964

Alle Mitglieder, Familienangehörige und Freunde unserer Vereinigung sind zum diesjährigen Kongress eingeladen, den der Internationale Verband der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) im Zentralbahnhof Brüssel abhält. Anmeldungen sind zu richten an: s-ro de Bruyne, Centra Stacio, Bruselo 1, Belgio. Der Kongressbeitrag beträgt bis zum 31. März 1964 300 belgische Franken, für Familienangehörige, Pensionäre und Jugendliche bis 25 Jahre die Hälfte. Vom 1. April an erhöht sich der Kongressbeitrag auf 350 belgische Franken. Weitere Einzelheiten bitten wir dem verteilten Anmeldeformular sowie dem IFEF-Organ „La Internacia Fervojisto“ zu entnehmen.

GEFA

„Regna Fervojo“ militiste organizita

Unueca komandopotenco kun specialaj privilegioj
Fervojistaj batalgrupoj bone armitaj

La tuta organizo de la orientgermana Regna Fervojo funkcias laŭ militistaj vidpunktoj. Disponiganto-sistemo, kvarbrigadoj, batalgrupoj kaj la t. n. „oficejoj de la prezidantoj kaj oficestroj“ estas rimedoj ne nur por kontroli la labornormojn kaj influi ideologie interne de la Regna Fervojo, sed krom tio ili servas ankaŭ al pure militistaj celoj.

Por la „funkciigo de la unueca komandopotenco“ estas enkondukita en 1954 la sistemo de la disponiganto. En ĉiuj direktivoj de la superaj funkciuloj fervojaj kaj en ĉiuj preskriboj kaj publikaĵoj estas ĉiam substrekte, ke la unueca komandopotenco per la disponiganto-sistemo havas vivonecesan gravecon por la tuta Germana Demokrata Respubliko.

Produktaltiĝo kaj kontrolo

La disponigantoj pri nodostacioj, linioj, distriktoj, vagonoj kaj lokomotivoj estas ekipitaj per eksterordinaraj privilegioj. Helpe de la disponiganto-sistemo oni atendas produktaltiĝon, krome ĝi servas por kontroli ĉiun fervojiston de la funkcia kaj trafika servo. La disponigantaj estroj en la 28 fervojaj oficejoj kaj 8 fervojaj direktoj kaj la disponiganta ĉefestraro de la Ministerio por Trafiko tenas fikse en la manoj la tutan fervojan funkcion, kaj ili povas enmiksi sin ĉiutempe surbaze de propraj privilegioj aŭ laŭ supera ordono.

Ordonoj, ordonoj

Al la militista organizo de la Regna Fervojo apartenas ankaŭ la militista lingvo kaj esprimmaniero. Ekde la ministro ĝis la plej maleminenta funkciulo oni uzas „ordonojn“. Tio koncernas ne nur la oftajn „tagordonojn“ de la Ministro por Trafiko pro elstaraj motivoj

kiel ekz. komence de la „aŭtuntrafika batalo“, sed ĝi validas ankaŭ por ĉiuj gravaj direktivoj. Ili komenciĝas ĉiam per la vorto „mi ordonas“. Esprimoj kiel „ordonpotenco“, „komandopotenco“, „batalstabo“ ktp. estas ĉiam uzataj, ĉu de maleminentuloj, ĉu de elstaraj funkciuloj.

La „kvarbrigada sistemo“

Per la enkonduko de la „kvarbrigada sistemo“ la unueca komandopotenco estas pli forte fiksita. La disponigantoj validas kiel komandantoj de ĉiuj brigadoj en la funkcia kaj trafika servo. Samkiel la disponiganto-sistemo estas kopiita de la Sovetunio ankaŭ la kvarbrigada sistemo. Ĉiuj fervojistoj de la ekstera servo (funkcia, trafika kaj lokomotiva servoj) estas organizitaj per la kvarbrigada sistemo en konstantaj laborgrupoj, do brigadoj. Ĉiu brigado laboras en kvar sinsekvoj. La sinsekvoj estas unuece fiksitaj por ĉiuj fervojoj de la soveta influfero. Ĉiu brigado, sekve ankaŭ ĉiu fervojisto povas esti rekontrolata. La politika administracio promesis al si per la kvarbrigada sistemo ideologian influon pli intensivan por la fervojistoj.

Alarmplanoj kaj batalordonoj

Paralele kun la „funkciigo de la unueca komandopotenco“ estas enkondukita ankaŭ disciplinregularo por la fervojistoj, kiu transformas la fervojistojn en duonajn soldatojn. La fervojistoj estas devigataj strikte obei al ĉiuj partiaj kaj ŝtataj funkciuloj. Ili devas aparteni al militistaj organizoj. La plej grava el ili estas la „helpantoj de la transportpolicistaro“. La „batalgrupoj“ de la Regna Fervojo estas la plej fortaj kaj plej bone armitaj en Orientgermanio. Ĉiu fervoja ejo — egale, ĉu

stacio, riparejo aŭ oficejo — disponas pri alarmplanoj, defendoplanejoj kaj batalordonoj por militkazo. Dum krizaj periodoj en la ekstera politiko la plej gravaj instalaĵoj estas gardataj per armitaj fervojistoj.

Ne plu indikiloj pri altitudo

Pro militistaj motivoj la Regna Fervojo atentis eksterordinare severe la sekretan deponadon de ĉiuj funkciaj statistikoj kaj aktoj. La indikiloj pri la altitudo, kiuj estas enmasonitaj antaŭ 100 jaroj dum la konstruo de la stacidomoj por anonci, kiel alte situas la stacidomo super la mar-nivelo, devis esti forigitaj. Sur la akvokranoj estis indikitaj ĝis antaŭ kelkaj jaroj la malmolgradoj de la akvo, por ke la lokomotivestro povu elkalkuli, kiom da moliga elemento li devas aldoni al la porlokomotiva akvo kaj kiel ofte senŝlimigi la lokomotivkaldronon.

Bildhoraroj sekretaj

Kiel speciale sekretaj validas ĉe la Regna Fervojo la bildhoraroj. Ĉiuj detaloj ekzistantaj de ĉiam en tiuj horaroj kaj montrintaj altitudojn kaj kurbojn de la linio estas forigitaj por ke en la kazo de perdo tiuj indikoj „ne falu en la manon de la malamiko“. Kiel ampleksaj estas la preskriboj pri sekretaj objektoj, evidentiĝas el tio, ke en la oficejoj neniu povas forlasi ĉambron malfermitan; ŝlosilo ankaŭ ne rajtas resti en la seruro, se la ĉambro estas okupita.

„Malgranda frato de la popolarmeo“

La eminentaj funkciuloj ofte ripetis la aserton, ke la fervojo estas ekipita kiel „malgranda frato de la popolarmeo“ por ĉiuj eventoj. Sendube ili multe klopodis prepari organize kaj ideologie la „militkazon“. Ĉu sukceso estas alia demando, ĉar ofte jam ne funkcias la trafiko laŭdezire en la normala kazo. Traduk. el „Der Bundesbahn-Beamte“ de W. B.

Jarkunveno de FEFA

Kiel kutime okazis en Parizo la jarkunveno de la Franca Fervojista Esperanto-Asocio (FEFA) la 30an de novembro kaj 1an de decembro 1963. Unuafoje partoprenis ĝin ankaŭ grupo da gejunuloj de GEFA.

Sabaton matene ni estis afable akceptataj de pli ol 10 francaj gejunuloj sur la perono de la norda stacidomo kaj de tie ĝentile gvidataj dum la tuta tago tra la unika metropolo. Vespere ni, ĉirkaŭ 30 gejunuloj, kolektiĝis en la kunveno de la pariza fervojista Esperanto-junularo por amuzi kaj danci. Poste ni admiris ĝis postnoktmezo la famajn

amuzejojn ĉe „Place Pigalle“ kaj „Montmartre“.

Dum la oficiala kunveno, dimanĉon matene, salutis nome de GEFA kol. Doliwa. Cetero oni laŭdis la brilan, ekzemplodonan junularlaboron de la parizaj grupoj. Do, rilate la junularon FEFA povas esti senzorga. La distra parto posttagmeze ĝojigis nin per altkvalitaj programeroj. Vespere apud la trajno ni adiaŭis, preskaŭ plorante, de la karaj geamikoj, kiuj senkoste estis gastigitaj nin en siaj hejmoj. Dum la tuta nokto ni konversaciis en la trajno pri la neforgeseblaj travivaĵoj.

Günther Doliwa

Ni legis en ...

Die bei unserer Vereinigung eingehenden Zeitschriften werden weiterhin nach ihren Herkunftsländern verteilt. Wir empfehlen unseren Mitgliedern, sich über die zahlreichen Ereignisse auf dem laufenden zu halten. Die Esperanto-Zeitschriften werden von den Esperanto-Beauftragten folgender Bezirke gesammelt und stehen auf Anforderung zur Verfügung:

Hamburg: Belgien, Dänemark, England, Niederlande

Hannover: Frankreich, Jugoslawien, restliche Länder

Nürnberg: China, Finnland, Polen

Regensburg: Schweiz, Spanien, Übersee

Saarbrücken: Italien, Schweden, Ungarn

Wuppertal: Bulgarien, Österreich, Tschechoslowakei

En **BULGARA ESPERANTISTO** troviĝas (en nov.) valora lingva leciono pri la esperantaj versoj.

Bulteno de la Aŭstria Sekcio de IFEF raportas (en dec.) pri la feria semajno en Oberalmberg (Svislando).

Bulteno de la Esperanto-Societo de Finnlandaj Fervojistoj donas (en n-ro 3) superrigardon pri la situacio de la Stafservoj en 1962.

DEFA-Bulteno de la Dana Esperantista Fervojista Asocio, detale pritraktas (en jan.) Belgion, la venontan kongreslandon.

EUROPA UNIO, eldonita de la Hispana Esperanto-Instituto, surprizigas (en majo) per kelkaj bone tradukitaj kanzonoj.

FEROVJISTO, organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda, okupiĝas (en nov.) pri la nova Tookajdolinio en Japanio.

FRANCA ESPERANTISTO anoncas (en nov.), ke la 56a Nacia Kongreso okazos en Parizo de la 16a ĝis la 18a de majo 1964.

HUNGARA FEROVJISTA MONDO, modele redaktita, interese raportas (en n-ro 3) pri la stalaktika groto de Aggtelek, unu el la vizititaj lokoj de la IFEF-kongreso 1962.

INTERLINGVISTIKA INFORMSERVO, eldonita de la Societo por Internacia Lingvo, esploras (en sept.) la avantaĝojn de Esperanto en la dokumentado.

La **Fervojisto**, organo de la Franca IFEF-sekcio, prezentas (en dec.) la raporton de la novorganizita jarkunveno, el kiu kristaliĝas la poresperanta intereso de la junularo.

La **Funelo/Der Trichter** unternrichtet (in Nr. 4) über den gegenwärtigen Stand des Esperanto-Unterrichts an den Schulen.

La **Gazeto**, francedevena revuo, ilustras (en okt.) per bildoj kaj tekstoj la evoluon de la Ruĝa Kruco.

MONDA KULTURO akcentas ankaŭ en sia aŭtuna eldono la internaciecon de siaj kontribuantoj, precipe per fabeloj kaj rakontoj. Pliriĝita estas parto de la bildoj.

Svisa Fervojisto publikigas la rezultojn de la komitatkunsido en septembro.

THE WORKER ESPERANTIST pritraktas (en nov.) en sia lingva angulo la uzadon de la reflektivaj pronomoj.

Anoncoj

Eldoniĝis en indonezia lingvo la broŝuro „Esperanto, ĝia strukturo, evoluo kaj progreso“, en kiu troviĝas ankaŭ esperantlingva artikolo. Por subteni la tian kreskantan Esperanto-movadon, niaj legantoj estas petataj mendi kontraŭ 3 resp. kuponoj tiun 32paĝan broŝuron per: s-ro Liem Tjong Hie ĉe Toko Djomas Dj. Gadjah Madu 60, Semarang, Indonezio.

Duden, bildvortaro aperos en Esperanto. Kiu estas preta kunlabori kontraŭ rekompenco? Seriozaj interesuloj, precipe el la fervoja medio, anoncu sin ĉe la eldononto: s-ro Rüdiger Eichholz, Esperanto-Press, Oakville / Ontario, Kanado.

Korespondadon kun germanaj fervojistoj deziras:

— s-ro Leono Zlotnik, Dzerzinskoi 12 — 42, Vilnin — 5/Litovio, UdSSR

— s-ro Ilija Ĉortanovski, zel. stanica, Madzari, Jugoslavio

Malkostajn presajojn el la politika kaj kultura vivo de Ĉinio ofertas per katalogo: Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

La Esperantista Kulturdomo denove prezentas riĉan programon dum la pas-kaj, someraj kaj postsomeraj sezonoj. Restado en tiu idlie situanta kastelo ĉiam estas agraba. Informoj kaj aliĝoj: Esperantista Kulturdomo, Kastelo Grésillon, Baugé (M. et L.), Francio.

Inter la 16a kaj 23a de februaro 1964 okazos en la skidometo „Berglandhaus Grossarl“ apud St. Johann, Aŭstrio (alteco: 1620 m) internacia skisemajno por la junularo, kiun partoprenos ankaŭ franca grupo. Aliĝu rapide ĉe: Günther Doliwa, 3031 Cordingen n-ro 16, deĵor-adreso: Bf Cordingen über Hannover.

Por la karnavalo:

„Brandon“ lia lasta vort'

Brandon! lia lasta vort',
kaj poste prenis lin la mort'!

Kaj li venis en ĉielon,
sed ne restis longe, ĉar
li protestis, ke per lakto
lin regalas anĝelar'.

La soifo lin turmentis
post alveno en infer',
sed nenion krom sulfuro
servis al li Lucifer'.

Nun li vagas tra la kosmo
sen espero por etern',
ĉar raketoj ĉie estas,
sed nenie ajn tavern'.

Traduk. de Bernhard Zenker

Por mediti:

En la plej fuŝa ŝtato ekzistas la
plej multaj leĝoj.

Tacitus
(romania verkisto)

Vorstand und Beauftragte der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (Stand: Januar 1964)

Vorstand

Vorsitzender: BOI Gießner, Bf Elze (Han), Basa 949/832/31
Sekretärin: BOS'in Kruse, Sozialamt Frankfurt, Basa 955/2759
Schriftleiter: BOI Barnickel, Tarifamt Frankfurt, Basa 955/5683
Sonderbeauftragte
Kassierer: BAmtn Denk, Prüfungsamt bei der BD Frankfurt, Basa 955/1506
Sprachprüfungen: BOAmtn Dr. Lang, Prüfungsamt bei der BD Frankfurt, Basa 955/1501
Fachwörtertum: BI Ritterspach, Tarifamt Frankfurt, Basa 955/2239
Bücherei/BULTENO-Versand: BOBw Schiermann, Bf Poppenburg, Basa 949/852/43

Bezirksbeauftragte:

Augsburg: BI Schiefl, BA Kempten (Allg), Basa 964/844/430
Essen: BOAmtn Schnetzer, Bf Hamm (Westf), Basa 944/807/391
Frankfurt: BOAmtn Dr. Lang, Prüfungsamt bei der BD Frankfurt, Basa 955/1501
Hamburg: BOI Lepke, BD Hamburg — B-Büro —, Basa 947/5444
Hannover: BS Heimlich, Bm Soltau (Han), Basa 949/850/127
Karlsruhe: BOI Hug, BD Karlsruhe — Ps-Büro —, Basa 953/5005
Kassel: BOI Keil, BD Kassel — Ps-Büro —, Basa 957/1270
Köln: BS Mester, Bf Rheydt-Geneicken, Basa 943/882/122

Mainz: BAss Ritthaler, Bf Albsheim, Basa 954/832/420/3
München: BOS Behr, Bb-Schule München, Basa 962/7563
Münster: tBI Brandenburg, Bm Münster 3, Basa 945/397
Nürnberg: BOI Gößmann, BD Nürnberg — V-Büro —, Basa 966/5857
Regensburg: tBOI König, AW Weiden, Basa 965/829/622
Saarbrücken: BOS Winkelhaus, AW Saarbrücken-Burbach, Basa 956/807/613
Stuttgart: BI Kiefer, BD Stuttgart — Ps-Büro —, Basa 952/1156
Wuppertal: BI Graß, BD Wuppertal — T-Büro —, Basa 946/468

El la grupoj

Aachen. La fervojistoj esperantistaj el la direkcia distrikto Köln okazigas la 14an de decembro sian distriktkunvenon en la malnova imperiestra urbo Aachen. Pli ol 30 gesamidanoj, fervojistoj, membroj de la urba grupo kaj gastoj el la limregiono de Belgio kaj Nederlando kunvenis en la bele ornamita salono de la restoracio „Im alten Zollhaus“.

Kolego Mester, la komisiito por la distrikto Köln, bonvenigite la ĉeestantojn akcentis, ke la BSW-distriktestraro fervore akcelas kaj subtenas nian movadon. En la programpunkto pri organizaj aferoj oni ĉefe diskutis, kiamaniere ni plej bone povas varbi kaj distavistiĝi nian lingvon kaj ideon inter la junaj fervojistoj. Kolego Becker el Aachen faris du interesajn lumbildparoladojn pri Aachen kaj ĉirkaŭaĵo kaj pri la gimnastika klubo Würseln. Sekvis lumbildparolado pri la rava internacia somerumejo Primošten en Jugoslavio prezentita de kolego Hönemann el Aachen.

Pro la grava festotago, la 15a datreveno pri la agnosko de la „Homaj Rajtoj“, flanko de UNESCO kaj UNO, kiun ni volis ankaŭ inde rememori, parolis la prezidanto de la Belga Esperanto-Asocio, d-ro Pol Denoel el Liège. Ankaŭ en la kunveno oni verkis salutrezolucion al la administracioj de UNESCO kaj UNO. Per la komuna kantado de la Himno finiĝis la sukcesplena kunveno. Tri ĵurnalistoj de lokaj gazetoj mem partoprenintaj la kunvenon favore raportis pri Esperanto kaj nia distriktkunveno. Rudolf Hönemann

Frankfurt. La tiea distrikto sub la gvidado de d-ro Lang aranĝis la 14an de decembro Zamenhof-feston, kiun partoprenis ankaŭ membroj de la loka grupo. Krom prelego pri la Homaj

Rajtoj okaze de la 15a datreveno de la konata Konvencio prezentiĝis lumbildparolado de kolego Jentsch pri Norditalio. W. B.

Köln. Neben den Zeitschriften „HEROLD“, „La Praktiko“ u. a. kann ab sofort die Zeitschrift „Norda Prismo“ an unsere Mitglieder im Bezirk Köln kostenlos abgegeben werden. Interessenten wenden sich an Koll. Jansen, Ga Rheydt Hbf, Basa 882/187.

Ferner steht den Gruppen das vom BSW-Bezirksvorstand beschaffte Tonbandgerät von nun an zur freien Verfügung. Anfragen nimmt der Bezirksbeauftragte entgegen.

Nürnberg. Vendredon, la 13an de decembro 1963, la Fervojista Esperanto-Grupo Nürnberg festis lunc kun la veterana Grupo Nürnberg kaj la nordbavara Esperantistaro en la festalongo de la trafikmuzeo Nürnberg „75 jaran Esperanton“.

La distrikt-komisiito, s-ano Gößmann, salutis la ĉeestantojn, precipe la membrojn de la veterana grupo. Li diris: Estas favora bilanco, ke la reputacio de la internacia lingvo kreskis. Ĉiu Esperantisto devas serĉi kontaktojn kun homoj de bona volo.

S-ano Pickel, la estro de la veterana Grupo, parolis pri la 75 jara jubileo de la Esperanto-Grupo Nürnberg. En decembro 1888, la anoj de la tiama „Weltspracheverein“ decidis akcepti kaj propagandi la internacian lingvon Esperanto, Christian Schmidt, la prezidanto de „Weltspracheverein“ estis la posta redaktoro kaj eldonanto de la unua Esperanto-gazeto, „La Esperantisto“, kiu unuafoje aperis sub la redaktora kunlaborado de d-ro Zamenhof en la jaro

1889. La plej elstara kaj agema membro de la tiama Esperanto-Grupo estis la ĵurnalista kaj vojaĝisto Leopold Einstein, kiu kelkajn monatojn post la konatiĝo kaj ellerno de Esperanto jam en la jaro 1888 eldonis la unuan Esperanto-ler-nolibron en germana lingvo.

Festparolanto estis s-ano Zeilinger. Li paroladis tre interese pri: La Homaj Rajtoj kaj Esperanto (germanlingve).

La konata humoristo kaj Esperantisto Michl Ehbauer el Munkeno ĝojigis la ĉeestantojn per bonega bavara humoro. Belegajn muzikaĵojn ludis kvarteto de la fervoja orkestro.

La Nürnbergaj ĵurnaloj raportis favore. Raportisto de radio Munkeno ankaŭ ĉeestis. Gößmann

Solingen. La ĵurnalo „Rheinische Post“ publikigis la 20an de decembro bilditan intervuon kun kol. Graß, la komisiito por la distrikto Wuppertal kaj la organizonto de la GEFA-jarkunveno 1964 en Solingen.

Stuttgart. In der Ausgabe vom 30. Dezember veröffentlichten die „Stuttgarter Nachrichten“ einen Bericht „Geburtstagsfeier bei den Esperantisten“, wobei der von der DB in Esperanto herausgegebene Faltsprospekt „Durch Deutschland mit der Bundesbahn“ lobend erwähnt wurde.

BÜCHEREI

Das Interesse unserer Mitglieder für die „Centra Biblioteko“ ist erfreulich groß. Der Bücherbestand ist inzwischen vergrößert worden. Wir werden jährlich wenigstens einmal die Neuerscheinungen bekanntgeben und sie als für Anfänger, Fortgeschrittene oder Sprachgewandte geeignet kennzeichnen.

GEFA

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Druck/preso: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.